

# BELGA ESPERANTISTO

## MONATA REVUO,

redaktata de Léon Champy, Fr. Schoofs, Van der Biest-Andelhof,  
Jer. Van Laere kaj Oscar Van Schoor.

### ABONPREZO :

Belglando . . . . .	Fr. 4.— (Sm. 1.60)
Eksterlando . . . . .	Fr. 5.— (Sm. 2.—)
Unu numero . . . . .	Fr. 0.40 (Sm. 0.16)

Sekretariejo : 49, Kleine Beerstraat,  
(rue de la Petite Ourse), Antwerpen-  
Anvers.

Abonoj kaj Monsendoj : 20, Vondel-  
straat (rue Vondel), id.

Jurnaloj, broŝuroj, libroj : 26, Arend-  
straat (rue de l'Aigle), id.

*Nepresitaj manuskriptoj oni ne resendas. — La Redakcio konservas por  
si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn.*

## Belga Ligo Esperantista

**Raporto pri la komitata kunveno, okazinta en Bruselo,  
je la 2<sup>a</sup> de Majo 1909, en salono de la « Café des  
trois Suisses.**

S<sup>ro</sup> Van der Biest-Andelhof, prezidanto, malfermas la kunsidon je la  
10 1/2<sup>a</sup> matene.

Ĉeestas :

Delegitoj de la ĝenerala kunveno : S<sup>roj</sup> L. Champy, Abato Richardson  
Fr. Swagers kaj O. Van Schoor. Senkulpiĝis : S<sup>ro</sup> K<sup>to</sup> Duverdyn.

Delegitoj de la grupoj : S<sup>roj</sup> Van der Biest-Andelhof kaj Finet (Antverpena  
Grupo), — Schoofs kaj Istace (Verda Stelo, Antverpeno), — D<sup>ro</sup> Dupont kaj  
Albert (Antaŭen, Beyne Heuzay), — F<sup>ino</sup> Ledène kaj S<sup>ro</sup> A. J. Witteryck  
(Bruga Grupo), — F<sup>ino</sup> Guillaume kaj S<sup>ro</sup> O. Chalon (Pioniro, Bruselo) kaj  
S<sup>ro</sup> Parotte (Esp. Grupo, Verviers).

Senkulpiĝis : S<sup>roj</sup> Schriewer (Amikejo, Neŭtra Moresneto), Havermans  
kaj Goossens (Berchem'a Grupo), Delvaux (Karlorega Grupo).

S<sup>ro</sup> L. Champy, sekretario, legas la raporton pri la lasta kunveno, kiu  
estas aprobata sen rimarko.

Oni pridiskutas la tagordon :

1<sup>o</sup> *Enkonduko de Esperanto en la Publikan Instruadon.*

La Prezidanto konigas kelkajn informojn ricevitajn de S<sup>ro</sup> Durieux, el  
Lille, kie Esperanto jam estas enkondukita en la lernejojn, kaj oficialaj  
diplomoj pri kapableco estas disdonataj. Ĉar la ĝis nun ricevitaj dokumentoj  
ne estas sufiĉaj por la raporto sendota al la Ministro de Sciencoj kaj  
Artoj, la kunveno decidas prokrasti la demandon ĝis post la Barcelona  
kongreso.

2<sup>o</sup> *Nia agado dum la Ekspozicio de Bruselo en 1910.*

La Prezidanto legas la leterojn skribitajn kaj ricevitajn pri tiu punkto,  
el kiuj oni konkludas ke la Ligo povas atendi diversajn monajn helpojn.  
La demando ne jam estas solvita kaj S<sup>ro</sup> Van der Biest denove korespondos  
pri la afero.



3<sup>o</sup> *Lingva Komisio.*

« Belga Esperantisto » enpresis la proponon de S<sup>ro</sup> Swagers kaj respondon rilatantan al ĝi. S<sup>ro</sup> Swagers deklaras ke, ĉar liaj ideoj pri la demando ne estas ĝenerale akceptataj li ne plu insistas, kaj reprenas sian proponon.

Li poste parolas pri alia maniero por atingi la saman celon. Post diskutado en kiu partoprenas S<sup>roj</sup> Chalon, Swagers kaj Abato Richardson, oni prokrastas decidi ion ajn ĝis post la Barcelona kongreso.

4<sup>o</sup> *Generala kunveno en Verviers.*

Oni fiksas la daton de la ĉiujara ĝenerala kunveno je *Dimanĉo, la 27<sup>a</sup> de Junio*. S<sup>ro</sup> Parotte konigas la ĉefajn partojn de la festprogramo: Akcepto en la Uibestrarejo, festeno, koncerto, balo. La Prezidanto dankas S<sup>ro</sup> Parotte kaj esperas ke la klopodoj faritaj de la Verviers'a Grupo bone sukcesos.

5<sup>o</sup> *Aliĝo de nova grupo.*

La kunvenantaro aprobas la aliĝon de la Brusela esperantista grupo « la Zamenhof »; ĉar la societo enhavas nur 18 membrojn, ĝi ne estas jam sufiĉe multnombra por havi delegiton. La Prezidanto deziras bonvenon al la nova grupo kaj gratulas speciale S<sup>ro</sup> Abato Richardson, ĝian Direktoron kaj fondinton.

6<sup>o</sup> *Diversaĵoj.*

La ekzameno por akiro de diplomo pri profesora kapableco okazos en *Antverpeno, je Dimanĉo la 20<sup>a</sup> de Junio*. La ĉestantaro decidas unuvoĉe doni la diplomon « Pro Honoro » al S<sup>roj</sup> Fr. Swagers kaj Ad. Finet, membroj de la ekzamenanta komisio.

La kunsido disiĝas je la 12 3/4<sup>a</sup> horo.

La ĝenerala Sekretario,  
L. CHAMPY.

---

## AVIZO

La ekzameno por akiro de la atesto pri profesora kapableco okazos en Antverpeno, je Dimanĉo, la 20<sup>a</sup> de Junio.

La gekandidatoj estos informataj pri la fiksita kunvenejo kaj horo.

La kondiĉoj kaj la programo de la ekzameno aperis en la Februara numero de « Belga Esperantisto », paĝo 57.

La enskriboj estas atendataj antaŭ la 15<sup>a</sup> de Junio. Mi esperas, ke multaj belgaj esperantistoj partoprenos en la ekzameno kaj esprimas la deziron ke baldaŭ ĉiuj esperantaj kursoj en Belglando estos nur instruataj de geprofesoroj diplomitaj.

Samtempe mi rememorigas ke literatura konkurso estas organizita de la Ligo (Vidu B. E., paĝo 76). La verkoj devas esti sendataj al la subskribinta prezidanto, antaŭ la 25<sup>a</sup> de Majo.

La Prezidanto de la B. L. E.,  
VAN DER BIEST-ANDELHOF.

## Internacia Kongreso por plibonigi la

### Blindulsorton, en Napoli (Italujo)

30<sup>m</sup> de Marto — 3<sup>an</sup> de Aprilo 1909

## Graveco de Esperanto en la Blinduledukado.

(Parolado de Frato Izidoro)

Historio tra ĉiuj jarcentoj montras, ke ĉiam la lingvaj konoj estas la disvastigiloj de civilizacio kaj religio, komerco kaj industrio, sciencoj kaj artoj, kiel ankaŭ, fatale, de eraroj ĉiuspekaj:

Ke ĉiam la grandaj landoj mezuris la vastiĝon de siaj fortoj per la disvastiĝo de sia lingvo; la malgrandaj, per siaj fremdlingvaj konoj.

Tio ankaŭ estas vera por individuoj, kaj la gloroza imperiestro Karolo V prave povis diri: « Oni estas homo tiomfoje, kiom oni parolas da lingvoj ».

Homo, kiu nur konas sian nacian lingvon, vivas ja en sia lando; sed nur en ĝi. Por la spirita vivo, la nekono de lingvoj estas barilo pli netransirebla ol la politikaj limoj, ol la spac-kaj tempdistancoj.

Nu ekzistas tra la vasta terglobo popolo miljonopa, sed, de distancoj, landlimoj, precipe de lingvobariloj dispecigata en malgrandaj homgrupoj. Estas blindulpopolo, kaj kun ĝi la blindulamikaro.

Kiel popolo, interligata de sindona solidareco pri samaj deziroj kaj vivkondiĉoj, la blinduloj nur ekzistas de unu jarcento. Antaŭ tiu tempo ili nur estis malfeliĉuloj unuopaj kun komuna suferado. Aperis Valentin Haŭi: ties homamo de l' scienco alvokas kunhelpon, kaj en tri lingvoj potencaj, france, germane kaj ruse, lia forta voĉo predikas tra la mondo la eblecon realtigi la blindulon, lin igi utilan membron de la societo.

Ha! Gesinjoroj, lasu min demandi: ĉu hodiaŭ ni estus ĉi tie kunvenintaj por daŭrigi la laboron de tiu bona kaj klera homo, se, por sia agado, li estus nur povinta disponi ian malgravan lingvon, de malgranda popolo nur parolatan? Ĉu kun li, inter la lingvoj de iu malmultkonata landa, lia eltrovaĵo ne estus nun malaperinta, por ĉiam perdita?

Se Ludoviko Braille, la blinda verkinto de l' Braillesistemo ne estus havinta la potencon francan lingvon por ĉie diskonatigi sian genian, simplan kaj praktikan elpensajon, kiom valorus nun la blindulinstruado?

Ĉu ne, en nia kaj ĉiuj aferoj, la eksterlanda disvastiĝo de la lingvoj sur la mondo etendas la progreson?

Kaj se iuj popoloj, pri nia aŭ aliaj aferoj, ne sekvas la antaŭeniradon, ĉu tio ne okazas, ĉar ilia lingvo ne povis sufiĉe kontakti kun la grandaj kvazaŭ mondlingvoj; ĉar enŝlosataj



inter siaj landlimoj, ili nenion povis ricevi el ekstero; ĉar ili ĉiam vidis, kontraŭ la neforigita lingvobarilo, haltigi la elsprucaĵon de sia genio, neniigi la klopodojn de sia agemo?

Ŝajnas, Gesinjeroj, ke post tia konsidero mi konkludos pri la nepra utileco instrui en niaj lernejoj, ne unu fremdan lingvon, sed plej multajn... kial ne ĉiujn, por ke la konkludo estu vere logika?

Tamen, ne! ĉar de kelka tempo oni trovis ion plisimplan, plibonan, plifareblan, plikompletan. Oni trovis lingvon internacian, de ĉiuj naciaj devenantan, enhavantan ĉies plejbonajn kvalitojn, pronasantan, laŭ internacia vidpunkto. la tutan profiton, kiu kuŝus en la plena konado de la lingvaro tutmonda.

Ĝia jam ege rimarkinda disvastiĝo tra la mondo permesas min ne paroli tie ĉi pri la valoro de Esperanto; mi nur pritraktos la superecon de ĝia uzado kompare kun la uzado de kelkaj fremdaj lingvoj.

Tiu supereco estas la sama, kiel, pri evolucio de la homara inteligento tiu de la presarto kompare kun la manskribo en antikvaj tempoj; la sama, kiel pri evolucio de komerco kaj ceteraj tutmondaj interrilatoj, tiu de la fervojoj kompare kun la iama malkomforta kaj malrapida veturilaro; tiu de la nuna vaporŝiparo kompare kun la antikvaj rem-kaj velŝipoj; la sama kiel, pri evolucio industria, tiu de la ĉiame pliperfektigita maŝinaro kompare kun la malmultprodukta manlaboro de antaŭ unu jarcento; ke. ke.

La granda utileco, la ja urĝa neceseco de lingvo internacia sin montras ĉiutage plievidente: ĝi estas la nepra konsekvenco de la antaŭenirado de ĉia monda progreso, al kiu ĝi mem baldaŭ fariĝos tute nemankebla antaŭenpuŝilo.

Ni tamen ne devas miri, ĉar ne jam ĉiuj komprenas tiun utilecon, necesecon; ĉu ĉiuj de la komenco komprenis la taŭgecon de la ĉi supre diritaj eltrovaĵoj? Ĉu ties iniciatoroj ne devis esti kuraĝozaj apostoloj, ofte martiroj de la monda indiferenteco kaj kontraŭstaro?

La Esperanta agado ankaŭ konis, ankoraŭ konas saman indiferentecon, ĉiuspecan kontraŭstaron; tamen ĝi ĉiam venke daŭrigas sian antaŭeniradon al la fina, kompleta triumfo. Kaj jam venis la momento, en kiu la inteligenta parto de la homaro ne plu povas neatenti pri ĝi; devas rimarki, ke ĝi ne plu estas haltebla; ke plilonga prokrasto de ĉies kunlaboro povas nur prokrasti la finan elvenkon, malpliigi la nunajn profitojn.

Gesinjeroj, ni tien ĉi kunvenis el multaj terlokoj; nin kunigis sama nobla kaj homama celo; ni venis por kunmeti la fruktojn de ĉies eksperimento; ni venis samtempe por lerni kaj instrui, kaj... ni ne interkomprenas!.....

Tamen la plejmulto el ni faris multe da lingvaj studoj, povas paroli aŭ balbuti iom france, germane kaj angle, kaj tamen... ni ne sufiĉe interkomprenas!

Ni venis tien ĉi grandkore, kunvokitaj de potenca solidareco; ni ĝuadas sur tiu bela Itala tero la plejkoran akcepton, kaj ni apenaŭ povas balbuti nian mir-kaj dankesprimon al la noblaj akceptantoj!

Kiom pli fruktodonaj estus niaj publikaj kunsidoj, kiom pli agrablaj kaj eblaj niaj interparoloj, se, en tiuj salonoj nur aŭdiĝus unu lingvo, al ni ĉiuj apartenanta, de ni ĉiuj komprenata kaj parolata!

Jes, tiu kongreso, niaj estontaj kongresoj laŭtege proklamas la oportunecon de la helplingvo internacia, la sama por ĉiuj.

Kaj kiam, post kelke da monatoj, la raporto de niaj laboroj venos permesi nin kapripoze repreni la lumŝprucajn lecionojn de tiu kongreso, venos permesi al niaj forestantaj kolegoj preni sian parton el la fruktoj de nia monda kunsidaro, por kiom el ni kaj el ili la lingvobariloj estos kvazaŭ ŝlositaj pordoj de ĉambro trozorplena? Kial do unu lingvo, por ĉiuj la sama, al ĉiuj ne povas diri kaj reiri la tutecon de niaj laboroj?

Ĉu la sama rezonado ne ankaŭ ege taŭgas pri niaj metodlibroj, pedagogi-revuoj aŭ alispecaj eltrovaĵoj kaj ĉia pliperfektigo en nia afero? La tuta tio ĉi momente vidas sian agadon bonfaran kaj progreseman haltigi kontraŭ la lingvobariloj! Apenaŭ se, po supermezura sumo da traduklaboro, kvindekfoje refarita, kelkaj eroj tra la landoj dissemiĝas.

Sed, ni suriru la kapon mem de l'blinduloj. Ili, ili precipe, rajtas kaj devas interesiĝi je tio, kiun ni por ili faras, des pli ĉar ofte, kiel profesoroj aŭ societmembroj, ili intense partoprenas en nia agado. Por ili, la lingvobariloj estas ja plidensaj pro la neebleco presi reliefe la ĵus nomitajn verkaj eldonaĵojn.

Ni ekzamenu nun kion produktas nia speciala Braille-presado. Longa estas la listo de muzikaĵoj, ĉar la muziko estas tutmonda lingvo, de ĉiuj blindaj artistoj komprenata, sammaniere skribata kaj legata. Multe pli mallonga la listo fariĝas se muzikon akompanas vortoj, kiel en kantoj, metodoj kun teksto klariga, k. t. p.

La lernolibroj, aŭ pliĝuste la elĉerpajoj el ili, ekzistas laŭ nur ĝustega bezono; kaj tute mankas en iaj lernejoj.

Sensignifa la produktado literatura kaj priscienca; tamen literaturo kaj scienco taŭgas por la tutmonda blindularo, estas por ĝi nepre bezono. Mi plie rimarkigos, ke la malmultaj literatur-kaj sciencaĵoj, kiel ankaŭ la kelkaj malgravaj gazetoj kaj revuoj estas presitaj angle, france aŭ germane, en tiuj tri potencaj lingvoj, pro ilia iomgrada internacieco.

(Daŭrigota)



## La « Zamenhof »

En Bruselo ekzistas juna, sed agema grupo, kies nomo estas « la Zamenhof », kaj kies honora prezidanto estas nia kara Majstro mem ; la poŝta karto per kiu li konigis la akcepton de la honora prezidanteco estas fiere kaj zorge konservata en la albumo de la societo.

« La Zamenhof » kalkulas 18 efektivajn kaj 10 honorajn membrojn ; la unuaj ĉiuj estas studentoj, la plej juna estas 14, la plej aĝa 18 jara. Ĝia direktoro estas Abato Richardson, kiu gvidas la anojn per siaj bonaj konsiloj kaj stimulas ilin per siaj entuziasmaj kuragigadoj.

La celo de la « Zamenhof » anoj estas ne nur perfektigo en la scio de nia bela internacia lingvo, sed ankaŭ interrilatigo kun ĉiulandaj samideanoj, kaj propagando de Esperanto inter la junularo. « La Zamenhof » aliĝis al la Belga Ligo Esperantista kaj apogas tiamaniere, laŭ la mezuro de siaj fortoj, la centralizadon de la esperanta agado en Belgando.

La junaj grupanoj kuniĝas ĉiusemajne ; dum siaj kunvenoj ili verkas la internacian korespondadon kaj legas la ricevitajn kartojn kaj leterojn ; ili korespondas kun esperantistoj el 16 landoj, eĉ el Madagaskaro kaj Japanujo. Kelkaj membroj interŝanĝas persone kartojn kaj leterojn kun fremdlandanoj.

Ilia devizo estas « Homo estu homa » ĉar ili profunde sentas en si mem la ideon internan de Esperanto, kiu estas la internacia homa frateco.

Se ekzistas inter la multnombraj legantoj de « Belga Esperantisto » samideanoj sin interesantaj al la juna grupo, kun granda plezuro ĝiaj membroj konatiĝos kaj korespondos kun ili.

PIERRE DE BRUYNE, sekretario,  
6, Avenue du Parc,  
St-Gilles-Bruxelles.

---

## LA INSULO RÉ

Unu el la plej interesaj ekskursoj fareblaj dum restado en la Franca urbo La Rochelle, estas ekskurso al la insulo Ré.

La Rochelle, la fiera urbo de la Hugenotoj, starigas siajn multnombrajn antikvajn turojn, kiel honorindajn postsignojn el glora estinteco, sur gracia golfeto ĉe la bordo de la Atlantika Oceano. Sed ne pri tiu interesega urbeto mi hodiaŭ parolos. De La Rochelle du insuloj estas en la malproksimeco videblaj : norde, la insulo Ré, sude Oléron. Vaporŝipetoj faras regulan servon inter la kontinento kaj la insuloj. De La Rochelle al la insulo Ré, la marveturado daŭras proksimume du

horojn ; ĝi estas pli mallonga kiam oni enŝipiĝas en La Pallice, la granda komerca haveno de La Rochelle (ĉar tiu ĉi lasta estas precipe haveno por la fiŝkaptado). De La Pallice, per vaporŝipeto tute malgranda kaj nekomforta, oni marveturas dum kvarono da horo, kaj oni atingas la orientan nudan ekstremajon de la insulo. Tie vagonaro atendas, tiel antikva kaj senluka kiel la vaporŝipo. En du horoj proksimume ĝi traveturas la tutan insulon, sur longo da 40 kilometroj, preterpasante multajn interesajn lokojn, inter aliaj St Martin de Ré, La Couarde, Ars-en-Ré, Phare des Baleines. Ŝtonvojo sekvas preskaŭ la saman direkton, kaj estas multe pli agrable, multe pli interese, traveturi la insulon per kaleŝo. Tion mi faris sur granda parto de la traŭrado, de St Martin ĝis Ars-en-Ré. Kaj tiu komunikilo estis ankoraŭ pli malnova, pli senmoda kaj nekomforta ol la vagonaro. Estas kurioze, kiel, tiel proksime de la kontinento, la moroj ŝajnas malfrui minimume kvindek jarojn.

La tuta insulo estas vasta ebenajo, kun tre malproksima horizonto. La kulturo konsistas precipe el malaltaj vinberujoj, kaj inter la vinbertrunkoj oni kulturigas asparagojn ; sed ambaŭ, vinberoj kaj asparagoj, ne estas tre bongustaj, tial ke oni sterkas la teron per fuko (varech). Tiu fuko, eljetita el la maro kaj forblovita de la vento, kovras la insulon ĝis tre antaŭe en la teroj, disvastigante karakterizan fiŝodoron ; kaj saman gusteton ĝi donas al la kulturajoj ŝterkitaj per ĝi.

La marbordo sin prezentas kiel tre diversaj. Sur granda parto, speciale sude de la insulo, etendiĝas vasta, belega sablobordo ; aliparte estas ŝtonaj krutajoj, aŭ eĉ kelkaj sablaj montetoj kun abiaroj. Sed ĉiam la bordo estas sovaĝa, impresiva ; ĉiam oni vidas antaŭ si la grandan, senliman Oceanon, ĉiam oni aŭdas ĝian plendantan aŭ mugantan voĉon. La sud-okcidenta bordo estas tre danĝera por la marveturado : vastegaj rifoj sin etendas laŭ tiu bordo, la ondoj leviĝas saŭmantaj kontraŭ ili, kaj je la forfluo oni povis ekvidi la tutan perditajn de ĵus pereinta kvarmasta velŝipo (la franca ŝipo «Gers» Aprilo 1905). Sur unu parto de la insulo, apud Ars-en-Ré, la du marbordo tiel alproksimiĝas la unu je la alia, ke restas nur inter ili la vojo kaj la digo ; la vidaĵo estas bela : ambaŭflanke oni nur vidas la maron.

Multnombraj vilaĝoj kaj urbetoj estas dissemataj en tiu regiono kiu ŝajnas tiel izola kaj trankvila. La ĉefurbo estas St Martin de Ré (Sankta Martino). Ĝi estas malgranda haveno, samtempe ol fortikajo kun remparoj kaj citadelo. Tiu ĉi estas la malliberejo kie atendas la kondamnitoj enŝipiĝontaj al la kolonioj. Sankta Martino estas urbo sufiĉe granda, kun multetaĝaj domoj, komfortaj hoteloj, kaj eĉ kelkaj belaj magazenoj. Ĝi ankaŭ posedas ruinon de mezepoka abatejo.



En la najbarajo de La Couarde, oni miras trovi en la abiaroj kelkajn modernajn kampodomojn. En la vilaĝoj, la domoj estas ĉiuj tre malaltaj, senetaĝaj, kaj senmakule kalkepentritaj. Estis je la Paskfesto kiam mi vizitis la insulon, kaj ŝajnis al mi ke ĉiuj domoj kaj dometoj vestigis per nova blanka paskrobo. Kaj en tiuj mallarĝaj, puregaj vilaĝstratetoj moviĝis pentrinde la blankaj kvadrataj kufoj de la insulanoj. Ĝenerala estas ankoraŭ la uzado de la loka kapvestaĵo. Nur en la plej grandaj centroj oni vidas kelkajn esceptojn.

Ĉe la okcidenta ekstremajo de la insulo, apud danĝeriga rifplena loko, starigas la altega Lumturo de la Balenoj (Phare des Baleines). Ĝi estas la plej alta el ĉiuj lumturoj de la Franca okcidenta marbordo. La turistoj supreniras la turon kaj oni povas imagi la imponantan vidaĵon kiun ili ĝuas de tie supre. (Mi malfeliĉe, pro manko da tempo, povis nur daŭrigi mian vojaĝon ĝis Ars-en-Ré, kaj ne vidis la lumturon). Mirinda fakto estas ankaŭ ke ĉiuj turoj de la preĝejoj estas uzataj kiel gvidturoj por la fiŝkaptistoj kaj marveturistoj. La supraĵo de tiuj turoj estas je la pinto nigrigita per gudro, kaj sube blankepentrita per kalko. Tiamaniere ili estas videblaj de tre malproksime.

Nun mi nur aldonos kelkajn vortojn pri la salmarĉoj (marais salants). Per kluzoj la marakvo enfluas en vastajn malaltajn kampojn apartigitajn en fakoj. Tie oni lasas ĝin vaporigi per la suno. La marakvo demetas la salon, kaj viroj kaj virinoj starantaj sur la fakrandoj, ŝovelas tiun salon en amasoj, kaj ŝarĝas ĝin en korboj. La rikolto de la salo estas, krom la fiŝkaptado, unu el la ĉefaj okupadoj de la insulanoj, kaj la salmarĉoj estas tre multnombraj, precipe en la proksimeco de Ars-en-Ré, beleta urbeto sur la golfo de tiu nomo (mer d'Ars).

Por resumi tiun priskribeton de la insulo Ré, mi konkludas dirante ke ĝi estas vere vizitinda. Kiam oni vojaĝas en la najbarajo, oni nepre devas entrepreni tiun ekskurson. Tiel proksima de la kontinento, la insulo estas tamen tute mal-simila. Ni miras pro ĉio, pro la simplaj moroj de ĝiaj loĝantoj, pro la kvieteco de ĝiaj domoj, pro la senlimeco de ĝia horizonto, pro la sovaĝeco de ĝiaj marbordoj. Ĉio kaptas kaj meritas nian atenton, kaj mi certigas ke mia esplorvojaĝo al la insulo Ré estis tiel interesplena kiel agrabla.

MARIA POSENAER.

## Himno de Amikejo

Dedicata al la laboroma Esp. Konsulo en Amikejo

KARL SCHRIEWER.

Laŭ la melodio « La Espero »

Nova vorto flugas tra la mondo,  
En Esperantujo jam konata :  
Amikejo ĉas en la rondo,  
Vort' de ĉiuj ĝoje akceptata.

Propran hejmon havas Esperanto  
Nun en nia bela Amikejo,  
Kaj por ĉiu ajn alvizitanto  
Estas ĝi komforta kongresejo.

Se tro granda ŝajnas nia ago,  
Multaj estas niaj favorantoj,  
Kaj sur blua Moresneta lago  
Sonos esperantaj ĝojokantoj.

Amikejon venu do, homaro ;  
Vivu nia internacieco ;  
Ni oferu ĉiuj ĉe l'altaro,  
Ce l'altaro de la amikeco.

PEKA

---

## ESPERANTO FACILA

### Pri Litpredikoj.

En la trinkejo « Ora Barelo, » ĉe la ronda gastotablo (1) (ne Esperantista!) S<sup>ro</sup> Gluviro pasigas la plej agrablajn horojn de sia vivo. Ĉar la tiea biero estas bonega, la amikoj sinceraj kaj babilemaj (2), la rondo gaja. Nur pri la trinkeja horloĝo, S<sup>ro</sup> Gluviro ne estas kontenta : ĝi ja ĉiam ŝajnas trorapidi (3), kaj ofte enuaj litpredikoj (4) atendas nokte revenantajn edziĝintajn gastotablanojn.

Luvespere, en la lasta vintro, Gluviro revenis en sian straton, je la dua matene ! Frostis, neĝis ; eĉ por bierplenigita korpo la vetero estis malagraba. Gluviro haltis antaŭ la numero 48<sup>a</sup>, kaj, ne trovinte ian ŝlosilon en sia poŝo, li sonorigis...

Tondro kaj fulmo ! oni ne ŝajnis rapidi por malfermi la pordon. Ankoraŭ li sonorigis, tre kolere nun, malgraŭ sia timo pro sia edzino, filino de la fama kolonelo Muelilo.



Ankoraŭ longa atendo... Fine, bruo aŭdiĝis en la koridoro, oni forŝovis la riglilon (5), kaj aperis antaŭ la ebriulo (6).. malgranda, ĉemizvestita, frosttremanta (7) maljunulo, kiu ĝentile diris al Gluviro : « Senkulpigu, S<sup>o</sup>, via hejmo ne estas tiu ĉi, vi eraris, vi ja loĝas en la numero 84<sup>a</sup> . »

« Kion tio signifas ? » ekkriis Gluviro, « vi unue lasas min atendi en la frostoj kaj neĝo dum duonhoro, kaj fine mi eĉ ne loĝas tie ĉi ! Malĝentilulo (8). » !

*Pentrindaĵo !*

En tiu sama nokto, laŭtega edzina litprediko tremigis la murojn de la numero 84<sup>a</sup> .

La sekvantan sabatnokton, la sonorilego de la proksima preĝejo jam sendis tri gravajn frapojn tra la malvarman aeron, kiam S<sup>o</sup> Gluviro revenis hejmen. Tamen li ne estis tiom ebria kiom la antaŭan fojon, kaj nun havis sian ŝlosilon, per kiu li senbrue (9) malfermis la pordon de sia propra hejmo.

Li baldaŭ alvenis en sia dormoĉambro, kie lia edzino — ho feliĉo ! — muzike ronkegis. Ĉiam senbrue li senvestiĝis sin en la nokta mallumeco. Tiam, timegante la vekigon de l'edzino kaj ŝian teruran litpredikon, li pripensis, pripensis... kaj elpensis ruzon.

Nur ĉemizvestite, li sidiĝis apud la lulilo (10) de la infano, kaj komencis luli, unue tre dolĉe, iom post iom pli forte, fine, tiom bruege ke lia edzino vekigis.

« Celesto ! Celesto ! kion vi faras tie ? »

« Kara Pelajino, la infaneto ekploris, mi saltis tuj el la lito, mi lulas, vi vidas.. nun, feliĉe, ĝi ree jam dormas.. »

« Ho, certe, falsulo, ĝi dormas, jam de hieraŭ ĝi dormas tie ĉi en mia brako !... Ha ! ha ! drinkulo, vi volis trompi min ! k. t. p. (*Litprediko*).

\* \* \*

Nu, antaŭhieraŭ, ree nokte revenante, dum obstina pluvo, S<sup>o</sup> Gluviro ĵus rakontis la antaŭe priskribitan okazintaĵon al siaj du fidelaj amikoj, S<sup>o</sup> Plakalerko kaj Zabergemo, kiam la unua el tiuj du gastablanoj (ne Esperantistaj !) ekkriis :

« Ni konas bonan rimedon por senkolerigi litpredikeman edzinon. »

« Kio estas ? » demandis la du aliaj. »

« Fari ĉion kion la edzino ordonas. »

« Ni faru tion, jam tiun ĉi nokton, » proponis Gluviro.

« Bone, » deklaris Plakalerko, kondiĉe ke tiu kiu ne agos tiamaniere pagu vespermanĝon por ni triope. »

« Akceptate ! » ekkriis la trio, kaj kun tiu mistera intenco ĉiu drinkulo direktis sin al sia hejmo.

Kiam S<sup>o</sup> Plakalerko eniris la dormoĉambron, li trovis sian edzinon, legante ĵurnalon en la lito. Ŝi tuj komencis la kutiman (12) predikon : « Ha ! fine, jen vi estas ! Estas ree la dua horo ! Kaj kion mi vidas ? vi alportas vian malsekan pluvŝirmilon tien ĉi por malpurigi ĉion. Metu do ĝin en la liton mem, ebriulo ! »

« Bona ideo ! » diris Plakalerko, levis la littukojn kaj jetis la malsekan pluvombreton sur la liton.

Enirante sian ĉambron, S<sup>o</sup> Zabergemo senvole puŝis kontraŭ grandan ŝrankon. « Kial vi ne renverŝas ĝin ? » ekkriis lia subite vekita edzino.

« Vi pravas, » (13) diris Zabergemo kaj, kun granda bruo, renverŝis la meblon.

Ĉe sia alveno en la dormoĉambro, S<sup>o</sup> Gluviro, kiu vere estis la plej ebria el la trio, metis piedon sub dikan tapiŝon kaj multpeze falis teren. Lia plej bona duono, la severa kolonelfilino, vekita de la bruo, tuj komencis mokan litpredikon :

Ha ! bonege ! tian falon vi meritas ! Ho, vi drinkegulo ! mi dezirus ke vi disrompu vian kolon tiamaniere.

Sed Gluviro, rapide sin levante, protestis ridante : « Ho ! tute ne ! mi ne faros tion, mia kara Pelajino, mi pliŝatas (14) pagi vespermanĝon ! »

SKALDO.

NOTOJ.

- 1) gastotablo, gasttafel of stamtafel, *table de clients habituels*
- 2) babilema, praatlustig, *bavard*, — 3) trarapidi, voorloopen, *avancer*, — 4) litprediko, bedsermoon, *sermon de femme déjà couchée au mari pochard rentrant trop tard* — 5) riglilo, grendel, *verrou*, — 6) ebriulo, dronkaard, *pochard*, — 7) frosttremanta, van koude bevende, *grelottant de froid* — 8) malĝentilulo, onbeleefderik, *grossier personnage*, — 9) senbrue, geruchtloos, *sans bruit* — 10) lulilo, wieg, *berceau*, — 11) okazintaĵo, gebeurtenis, *evenement*, — 12) kutima, *gewoon, ordinaire* — 13) pravi, gelijk hebben, *avoir raison*, — pliŝati, *verkiezen, préférer*.

DIVERSAJ INFORMOJ

La abonantoj kiuj ne regule ricevas nian revuon, bonvolu informi pri tio S<sup>ro</sup> Fr. Schoofs, sekretario de la Redakcio, 49, Kleine Beerstraat, Antwerpen, (rue de la Petite Ourse, Anvers).

Ili estas petataj avizi S<sup>ro</sup> Schoofs pri eventuala ŝango de sia adreso.

— Esperanta Universala Asocio. — La Pentekostan London, 31<sup>an</sup> de Majo okazos en Huy, la ĝenerala kunveno de E. U. A. Ekzistas ĝis nun pli ol 30 delegitoj de tiu potenca tutmonda societo en Belgujo.

La celo de la kunveno estas : 1. firme kaj klare starigi la rilatojn inter U. E. A. kaj la Belga Ligo Esperantista. 2. decidi pri rimedoj por tuj komenci praktikan kaj ageman propagandon esperantan en ĉiuj partoj de nia lando. Sin turni al S<sup>o</sup> Landenne, Tihange (Huy).



— En Parizo fondiĝis lasttempe **Internacia ligo de la Esperantista Preslaboristaro**.

La vigla kaj lerta sekretario-fondinta, nia amiko Luis Carlos, farante alvokon al siaj samprofesiaj diras:

« Rápido aliĝi al la jus nove fondita Internacia Ligo de la Esperantista Preslaboristaro. Ni montru, ke ni estas progresemaj, kaj, ke nia inteligenta anaro kapablas plenumi sian iradon sur la vojo al Progreso, same kiel aliaj profesiaj gildoj jam faris. Interesataj ĉefe estas ni pri la vastigo de lingvo helpa, kiu ebligos nin pli intime interkonatiĝi kaj intersciigi pri la tutmonda evolucio de nia profesia arto. »

La jara kotizo estas 4 frankoj: oni bonvolu rekte sendi ĉiujn korespondajojn ke. al S<sup>ro</sup> Luis Carlos, rue Rollin, 7, Paris, V.

— S<sup>ro</sup> Olivet, belga kavaleria oficiro, 5, Van Ballaerstraat, en Antverpeno (Antwerpen-Anvers) deziras korespondi kun ekster-Eŭropaj kamaradoj.

— Ĉiuj partoprenontoj en la Va esperantista kongreso estas petataj sendi sian fotografajon al la Prezidanto de la kongreso, S<sup>ro</sup> F. Pujala y Vallés, Rambla de Catalunya, 89, Barcelono. Sur la antaŭa parto oni skribu supre la nomon de sia lando, malsupre tiun de sia familio kaj urbo. Sur la dorsa flanko estu la adreso. Tiu peto estas farita al B. E. de S<sup>ro</sup> W. Becker, Credit-Anstalt, Leipzig'o (Germanujo).

— Nia amiko kaj kunlaboranto, S<sup>ro</sup> W. A. Vogler, prenis sur sin la organizado de ekskurso al Skotlando. Vaporŝipo forveturos el Hamburgo vendredon la 23<sup>an</sup> de Julio, kaj alvenos en Leith, Edimburgo dimanĉon plm. — La Edimburg'a grupo feste akceptos la ekskursantojn, kiuj sub la atabla gvidado de skotaj amikoj vizitos la famajn belegojn de la lando, ankaŭ Glasgovo (Glasgow).

Ĉie la grupoj preparos festetojn. Reveturo ŝipe el Leith, sabaton la 31<sup>an</sup> de Julio; alveno en Hamburgo la 2<sup>an</sup> de Aŭgusto.

La tutaj kostoj de la ekskurso de Hamburgo kaj ree ĝis tie estos ĉirkaŭ Sm. 100 = fr. 250, eble iom malpli.

Se nombro de la vojaĝantoj deziras viziti aliajn partojn de Britujo, tio estos aranĝata.

La partoprenontoj dezirantaj vidi la vidindaĵojn de Hamburgo antaŭ aŭ post la ekskurso estos bone gvidataj.

Kompreneble estas tre dezirinde, ke ankaŭ gesamideanoj el Holando, Belgujo, Francujo kaj Anglujo aliĝu, por ke la aro estu plej altgrade internacia.

S<sup>ro</sup> Vogler petas insiste, ke la partoprenontoj sciigu lin kiel eble plej baldaŭ, por ke li faru la necesajn difinitajn aranĝojn kun la ŝip-kaj hotelmastroj. Adreso: 16, Rathausstrasse, Hamburg.

— S<sup>ro</sup> J. L. Bruijn, 70, Keppelstraat en Hago (den Haag), Nederlando, preparas la eldonon de « Esperantista Surmura Kalendaro » por 1910. Ĝia ŝildo havos amplekson da 25×33 cm, ĝi estos bele kolorpresata, reprezentante esperantistan simbolon: la bloketo 8×12 cm.

La antaŭa flanko de l'folioj surhavas la nomon kaj cifron de l'tago, la nomon de l'monato kaj kelkaj liniojn por rememordatoj, devizoj, proverboj ke: la dorsa flanko surhavas prozon aŭ poezion.

La enhavo estos tute neŭtrala.

La prezo de l'ruta kalendaro — afrankite ĉien — estos 60 sd. aŭ 6 internaciaj respondkuponoj, kun speciala rabato por grupoj: el la unua 100<sup>o</sup> da ekster Nederlandaj mendintoj ĉiu ricevos artan objekton.

La eldonisto alvokas ĉiun, kiu havus ion por konsili, deziri aŭ proponi por la bona aranĝo de l'kalendaro, kiel eble plej baldaŭ sciigi tion al li: la kalendaro estos presata kaj ekspedata en la komenco de Novembro.

— **Konkurso de « La Bela Mondo**. La eldonisto kaj la redaktoro de *La Bela Mondo* decidis malfermi konkurson.

**Kondiĉoj de la literatura konkurso:**

1<sup>o</sup> verki originalan novelon, rakonton aŭ artikolon ilustritan en prozo, kaj skribi ĝin plej legeble nur sur unu flanko de l'papero.

2<sup>o</sup> sendi, per rekomendita poŝto, la manuskripton al la redakcio de *La Bela Mondo*, D<sup>ro</sup> Schramm, Dresden-Ständehaus, antaŭ la 1<sup>a</sup> de julio 1909.

**Premioj:** La ĵugantaro samtempe atentis la elegantecon de la stilo kaj la intereson de la teksto. Ĝi disdonos la sekvantajn premiojn:

1<sup>a</sup> premio 50 M. (= 25 Sm.), 2<sup>a</sup> premio 25 M. (= 12.5 Sm.).

La aliaj aŭtoroj de bonaj tekstoj ricevos ĉiu po dek markoj da libroj. La premiigitaj tekstoj estos enpresataj en *La Bela Mondo*. La redakcio konservos por si la rajton, enpresi, post korekto se bezone, la nepremiigitajn tekstojn.

## BELGA KRONIKO

**ANTVERPENO.** Antverpena Grupo Esperantista. Tre sukcesinta intima festo kunigis je Sabato, la 24<sup>a</sup> de Aprilo, la membrojn de tiu agema grupo en la festsalono de la Hotelo Wagner.

La celo de la kunveno estis elmontri de danko al la bonegaj kaj amataj geprofesoroj Gesinoroj Claessens-de Deken kaj F-ino Eug. Gunzburg, kiuj bonvolis fari la esperantajn kursojn dum la periodo 1908-'09. Kiel materia atesto de sia danko la grupanoj prezentis al ili belegajn donacojn; ankaŭ la Komitato aldonis donacan memorajon, ateston de sia alta taksado kaj aprobo. Ĉarmaj paroladoj de F-inoj Ceulemans, Posenaer kaj de Jaegher; je l'nomo de la komitato parolis S-ro Van der Biest-Andelhof, kiu prezidis la kunvenon. Emociaj respondoj de la tri festherooj.

La muzika kaj deklama parto de la festo rikoltis grandan sukceson, dank' al la lertaj ĝeinterpretintoj S-ino Claessens, F-inoj Giffroid, Vermeulen kaj de Jaegher, S-roj Bernard kaj Olivet. Specialan mencion meritas F-ino Ida Vermeulen, kiu kun supera talento deklamis la « Preĝon sub la verda Standardo », verkitan de D-ro Zamenhof.

Fine resonis la multnombraj kantoj, lernitaj dum la lasta vintro kaj esperantigitaj de nia amiko Frans Swagers, kaj disigante, la ĉeestantoj entuziasme ekkantis la esperantistan himnon « l'Espero ».

La diversaj kantoj estis akompanataj de S-ro D-ro W. Van der Biest, kies muzika talento kaj sindono al la grupo, de longe estas konataj.

— **La Verda Stelo** La someraj kursoj bone sukcesas. La membroj de la V. S. baldaŭ starigos grupon en Bergerhout, loĝantplena antaŭurbo de Antverpeno.

**BERCHEM.** Esperanta sekcio de la Ruĝa Kruco. Intima kaj sukcesplena festo okazis la 19<sup>an</sup> de Aprilo en la kalejo « *De Vroegen Morgen* » sidejo de tiu ĉi interesa societo. La Berchemaj flegistoj de la R. K. kunigis siajn anojn por la ferma kunveno de la vintra kurso kaj samtempe por festi S-on Van Laere, la vigan profesoron kiu sukcesege instruas Esperanton al la Geruĝkrucoj de Berchemo. Oni multnombre apudestis kaj granda entuziasmo regis ĝis la fino. Ĉeestis interaliaj: S-o D-ro Moorkens, honorprezidanto; Philips, sekretario; D-ro W. Broeckaert, A. Havermans, prezidanto, kaj A. Goossens, sekretario de la B. G. E. — La Berchemaj flegistoj estas la unuaj kiuj enkondukis Esperanton en la R. K. de Belgando. Honoron al ili.

La sekvonta kurso estos tre interesa kaj utila; S-ro Van Laere daŭrigos la gramatikon kaj D-ro Broeckaert la teĥnikan parton de l'instruado.

— Antaŭ ne longe fondiĝis en Berchemo la esperantista grupo « La Verda Lumo » ĉefe celanta enkonduki Esperanton en la laborantajn klasojn. La societo organizis kurson; la unua leciono okazis merkredon, la 12<sup>an</sup>



de Majo. La sidejo de la grupo estas la Kafejo *Verda Lumo*, 108, Granda Ŝoseo, Berchem.

**BOOM.** La 3<sup>an</sup> de Aprilo la Boom'a Esperantista Grupo tre brile fermis la esperantan kurson, komencitan dum la monato de Novembro.

Je l'fino de l'instruado la afabla kaj lerta profesoro S-ro Frans Schoofs gratulis la gelernantojn pro la faritaj progresoj kaj incitis al ili daŭrigi sian studadon kaj resti fidelaj al nia kara Esperanto.

Per kelkaj elokventaj vortoj, S-ro Jules Clerbaut, prezidanto, laŭdis la sindonon de la estimata profesoro, kaj donacis lin, je l'onomo de la gelernantoj, per artplena memorajo, kunigante, je sia persona nomo, belan argentan medalon speciale frapitan laŭ la segilo de la grupo.

Tuj poste, kelkaj samideanoj improviziis kaj plenumis sukcesplenan programon: la gekantistoj F-ino Rachel Bleecx kaj S-ro Kam. Bal, la lerta violonisto S-ro Gust. Struyf kaj Rob. Spillemaekers estis tre aplaudataj.

Je l'fino, la fervora kamarado S-ro H. Van der Plancken ekkantis la Zamenhofan himnon « la Espero », muzikigitan de S-ro Alf. Mathys, el Duffel, kiu en la Boom'a grupo instruis Esperanton dum 1907-'08.

Disigante la Boom'aj esperantistoj laŭte aplaudis nian karan Majstron, kaj decidis unuvoĉe kunhelpi al la fondo de esperantista grupo en la najbara industria urbeto Willebroek. (1)

**VERVIERS.** S-ro **Spinhayer**, Skabeno de la Publika Instruado, akceptis la honoran prezidantecon de la **VERVIERS'A ESPERANTISTA GRUPO**.

**WILLEBROEK.** La 27<sup>an</sup> de Aprilo okazis en Willebroek tre sukcesinta esperantista propaganda festo, organizita de la Boom'a grupo kaj de la Antverpena grupo « La Verda Stelo » kun la bonvola kunlaborado de la Boom'a simfonio « de Kunstvrienden », sub la lerta direkto de S-ro Jos. Clymans.

Minimume 400 personoj ĉeestis la artplenan koncerton kaj atente aŭskultis la paroladon pri « Esperanto kaj ĝia nuna stato » de la sindona kaj nelacebla prezidanto de « La Verda Stelo », S-ro Frans Schoofs, kiu anstataŭis S-ron Van der Biest-Andelhof, malhelpitan pro malsano.

S-ro Ern. Mertens, komunuma sekretario, gratulis la parolinton kaj ĉiujn organizintojn de tiu agrabla festo, ne forgesante nian fervoran samideanon, S-ron Gust. Struyf, kiu prizorgis la muzikan parton: S-ro Mertens komparis tre prave pri ilia internacioneco la muzikon kun Esperanto.

S-ro Jules Clerbaut, prezidanto de la Boom'a grupo dankis S-rojn Mertens Bruyninckx kaj Van Dyck, kaj laŭdante la progreseman ĉeestantan urbestron S-ron Rob. Pecters, kiu jam promesis la tutan hunchelpon de la loka estraro, li rikoltis senfinajn aplaŭdojn.

Tuj post la festo, S-ro Jos. Bruyninckx, komunuma instruisto, sciigis ke li jam ricevis pli ol 80 aligojn al la starigota Willebroek'a grupo « La Espero. » (1)

La grupoj estas petataj sendi siajn informojn plej malfrue aŭtaŭ la 5<sup>e</sup> de ĉiu monato al la subskribinta raportanto, 20, *Strato Vondel* ANTVERPENO,  
O. VAN SCHOOR.

(1) Korespondajo de S-ro Babilon.

## Het Esperanto in den Vreemde

**FRANKRIJK.** — Het laatste nummer van de « Officiële Gazete Esperantista » geeft de volgende statistiek op:

Esperantische groepen: op 5 Maart, 1371 (verbeterd cijfer); op 5 April 1418.

Esperantische tijdschriften: op 5 Maart, 83; op 5 April, 86.

— De feesten op 18 April door de Parijzische federatie ingericht ter gelegenheid harer algemeene vergadering, zijn zeer schitterend geweest. Zij werden voorgezeten door den heer Prof. Bouchard, lid der Fransche Academie van wetenschappen en der Academie van Geneeskunde; nevens hem zetelden de hh. Generaal Sebert, Prof. Th. Cart, Prof. Carlo Bourlet en Generaal Priou, en vele voornamen andere esperantisten. De heer pr. A. Richardson, vertegenwoordigde er den Belgischen Esperantischen Bond.

Opmerkenswaardig was de medewerking van het 5<sup>me</sup> infanterie regiment. De heer Carlo Bourlet begroette de esperantische familie der Parijzer streek, die reeds meer dan 2000 leden telt. Hij bracht ook hulde aan de Belgische esperantisten, wier voorzitter hij, namens de geheele vergadering, een telegram van sympathie toezond.

De heer Bouchard, voorzitter, roemde de voortreffelijke eigenschappen van het Esperanto, en eindigde zijne rede met deze betekenisvolle woorden: « Konservu la Zamenhofan Esperanton kun ĝia tuta pureco! »

